



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA — DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 — AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 — Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 — 1182
Telefone 42-9090
70.000 — Brasília (DF)

Nº 24

ABRIL DE 1977

BOLETIM INFORMATIVO

ELEIÇÕES NO B.K.E.

Consoante vimos informando, ocorrerá a 8 de junho p.f. o término do mandato dos atuais diretores do Conselho Brasileiro de Esperanto, mais conhecido pelas iniciais B.K.E. (Brazila Konsilantaro de Esperanto).

25 Sociedades compõem o Conselho, e, de acordo com nossos estatutos, estas organizações deverão manifestar-se no sentido de se eleger a nova diretoria que continuará administrando o B.K.E. durante o novo período de três anos, até 8 de junho de 1980. Cumpre assinalar que, ainda de acordo com os estatutos, caberá a possibilidade de reeleição da atual diretoria, porém, para isso, torna-se necessário uma indicação por escrito das sociedades componentes do Conselho.


A chapa é composta de quatro elementos: o presidente, o vice-presidente executivo, o secretário geral e o tesoureiro. Estão terminando seu primeiro período os diretores: Francisco de Souza Almeida, presidente; Senhorinha Elvira Fontes, vice-presidente executiva; Nelson Pereira de Souza, secretário geral e Carlos Augusto Siqueira da Cunha, tesoureiro. Face aos cargos citados, não será difícil a confecção de uma chapa que deverá ser eleita pelas sociedades-membros. Pedimos encarecidamente a manifestação dos srs. presidentes das sociedades eleitoras.

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

Dragutin Waranka-Argentina

La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto. Oni tenu la principon: Ĉiu frazelemento staru apud tiu, al kiu ĝi senpere rilatas. La subjekton kaj predikaton oni povas rigardi kiel interrilatantaj. Ili staru apude kaj oni ne intermetu multajn frazelementojn. Intermetebaj estas: adverba adjekto (ĉar ĝi same rilatas senpere al predikato). "Li rapide kuras". Antaŭmeto akcentas la adverbbon. "Rapide li kuras". Intermetebaj estas: personpronomo objekto, por eviti ke ĝi staru frazfine. La subjekton predikatkomplekson oni rigardu kvazaŭ unu tuto. Oni povas ĝin laŭnecese ŝovi tien-tien ĉi en la frazo. Tio validas precipe pri personpronomo subjekto. Oni ne diru: "Li en la ĝardeno hieraŭ kun mia amiko promenis." Oni ilin apudmetu: "Li promenis hieraŭ." aŭ: "En la ĝardeno hieraŭ li promenis." Aŭ: "Kun mia amiko li promenis ..." aŭ: "Hieraŭ kun mia amiko en la ĝardeno li promenis". Se tiaokaze oni tamen intermetas frazelementojn, oni metu ilin inter komojn. Jene: "Fine li, post multaj malfacilaĵoj, sukcesis reveni". Inter predikaton kaj ĝian infinitivan komplementon oni metu maksimume personpronoman objekton, aŭ adverbbon rilatantan al la infinitivo. "Mi volas lin vidi". Mi ne povas bone distingi". Oni loku apude la du partojn

de kompleksaj verboformoj. Tamen estas pli elegante meti inter ilin personpronomojn, demonstrativojn, ktp.; per tio oni iom malpliigas la efekton de ilia pezeco. Ne "se mi estus vidinta lin", sed "se mi estus lin vidinta". Diru: "Li estas ege ofendita". Ne, "Li ege estas ofendita". Oni diru: "Se mi estus tion sciinta". Ne: "Se mi estus sciinta tion".



ADVERBOJ

1. La adverbojn "ankaŭ" kaj "eĉ" oni metu antaŭ la vorton, kiun ili senpere rilatas. De ilia ĝusta loko, dependas la preciza senco de la frazo: "Ankaŭ li ludis hieraŭ en la ĉambro (krom aliaj, ankaŭ li)". "Eĉ ŝi donis al mi unu libron" — (ne nur aliaj, sed ŝi mem). "Li ankaŭ ludis hieraŭ en la ĉambro (krom kanti, danci, ktp)". "Ŝi eĉ donis al mi unu libron" (ne nur parolis pri ĝi). "Li ludis ankaŭ hieraŭ en la ĉambro" (krom hodiaŭ). "Ŝi donis eĉ al mi unu libron" (ne nur al la koncernato). "Li ludis hieraŭ ankaŭ en la ĉambro" (krom en la korto). "Ŝi donis al mi ĉe la libron" (ne nur la manuskripto). Pri "almenaŭ" validas la samo: "Por fari tian vestaĵon vi bezonos almenaŭ 3 metrojn", (ne malpli). "Eĉ se vi konsentas, almenaŭ mi kontraŭstaros tiun proponon", (Se ne aliaj tion faros). La klarigan "ja" oni povas meti komence de la frazo. "Ja mi ne scias, ke ni estas tiel etnombraj". "Vi ja estis certaj, ke ni venos al la kongreso". La vorteto "ja" pli akcentas, estas pli forta ol "sendube". Ofte sekvata de "sed" aŭ "tamen". "Li estas ja mia filo, sed mi tamen ne pagos liajn ŝuldojn. "Ili ja estas miaj malamikoj, tamen ili restu liberaj". Se la frazo estas mallonga ĝi staru ĉe la fino: "Iru ja!" — JAM — estas tre elasta adverbo kun multaj nuancoj. "Jam" signas, ke daŭra ago aŭ stato estas komencita: "La tagmangō jam estas preta; li jam forvojaĝis". "Jam" signas: a) kun akuzativa tempadjekto, la komencon de la daŭro: "Mi estis oficisto tie preskaŭ jam du jarojn" (de antaŭ du jaroj); "nun jam

3 jarojn daŭras la milito"; b) por signi, ke la stato ekzistas kaj ne dependas de la interveno de nova faktoro: "Jam sen la heredaĵo li povis bone vivteni sin"; (ne dependas de la interveno de nova faktoro). c) ke momenta ago okazis, sekve finiĝis (= antaŭ nun, antaŭ tiam) "li jam forlasis la domon; "ĉu vi jam aĉetis novan ĉapelon". d) ke momenta ago okazos post pli — malpli longa atendo: "Jam finfine venos al mi en la kapon la forgesita vorto!" JAM NE — neas la unuan sencon kaj signas: a) ke daŭra ago aŭ stato ĉesis: "Li jam ne vivas" (=li plu ne vivas). b) ke atendata ago ne okazos: "Li jam ne venos". Inter "plu ne" kaj "jam ne" apenaŭ ekzistas diferenco: "Li jam ne vivas" kaj "li ne vivas plu" estas samsignifaj. "Ne...jam". Tiu esprimo estas laŭ la konsilo de Zamenhof evitinda, kaj anstataŭigota per ankoraŭ... ne. Ni ne diru: "Mi lin jam ne konas" sed "mi lin ankoraŭ ne konas".

JEN — havas emfazigan funkcion, krom ĝia proprasenco uzo. Emfaziga estas: "Jen kion mi proponas! Jen kial mi foriris! Jen tiun homon mi volas renkonti! Jen kiel mi faros la taskon!" — anstataŭ la simplaj senemfazaj ti-vortoj: "Tion mi proponas; tial mi foriris; tiel vi faros la taskon. La signifo de "jen" estas proksimume! "Jen tio ne plaĉas al mi. Fine oni uzas "jen" komence de frazoj kun la proksimuma signifo de "atentu, rimarku", ekz-e "vi volas paroli kun mi? Jen mi estas! Jen estas la tempo por aĝi kaj lerni! Vi ŝatus intervui la prezidanton? Jen li estas! "Jen" ripete signifas: "unu fojon...alian fojon" ekz-e "Li ĉiam trinkas vinon, jen ruĝan, jen, blankan; jen li veturis per aviadilo, pen per buso". Pli akcentata formo estas "jene": "mi jene gvidos la kurson". El "jen" oni povas formi adjektivon kun la signifo "tiu ĉi montrata": "ankoraŭ pli mallonga vojo estas jena". Oni formas ankaŭ substantivon kun signifo "tio, kio sekvas". "Mi volas komuniki al vi la jenon; tion ĉi li diris, kaj mi respondis jenon".

JUS — la adverbo "ĵus" signifas "ĝuste antaŭ nun, antaŭ tiam": "Mi ĵus alvenas; li

ĵus foriris, ĵus batis la tria horo, kiam ni eniris en la urbon; ĝuste pri tio mi ja ĵus parolis". Jusa. Ĵus okazinta: "Plej ĵusa numero de ĵurnalo". Pro tiu senco, ĝi nepre certigas la finon de la ago (tempo perfekta) do post "ĵus" estas superflue uzi kompleksajn verbo tempojn. Oni kelkfoje trovas "ĵus" uzata kun la senco: en la nuna (tiam) momento. Tio estas nekorekta. Ankoraŭ pli nekorekte estas uzi, ĝin en la senco: "precize". En tiuj ambaŭ sencoj oni uzu "ĝuste": "li foriris ĝuste, kiam mi alvenis; (samtempaj agoj) li foriris ĵus, kiam mi alvenis (li foriris momenton, antaŭ ol mi alvenis): li estas ĝuste tiu, pri kiu temas".

MEM — havas tri cĉefajn signifojn: 1) proprapersono: "nun la reĝo mem volis ĝin vidi; mi ne povas fidi min mem". De tiu senco venas la uzo de "mem" por meti du personojn, aĵojn, ktp. en kontrasto: "ĉiun demandu, sed mem al vi komandu; mi mem ankaŭ tion pensis". 2) per la propra ago, sen helpo de iu alia: "prenu mem akvon, se vi volas trinki; sed mi ja mem venis al tiuj ideoj, per mia propra saĝo". 3) per propra volo, sen ia ekstera trudo: "la maljunulo jam bedaŭras la tro rapidan paŝon, kiun li tamen, ŝajnas al mi, ne mem faris".

LA XII SEMINARIO DE ESPERANTO

La Kultura Kooperativo de Esperantistoj dissendis la unuan informbultenon pri la 12-a Seminario, kiu okazos en Santos (SP), de la 14-a ĝis la 17-a de julio de la jaro 1977-a.

La patrono de la evento estos nia samideano D-ro Antonio Manoel de Carvalho, indega urbestro de Santos.

La enskribiĝon faras la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Rio de Janeiro, Avenida Treze de Maio, 47 — sobreloja, 208 — ZC 06 — 20.000 Rio de Janeiro — RJ. La kotizo estas: por plenkreskuloj Cr\$ 120,00; por akompananto: edzino, gefiloj, ktp.) 60,00 — kion devas ankaŭ pagi la gejunuloj ĝis 25 — jaraĝa.

Ni kore invitas ĉiujn gesamideanojn partopreni la Seminarion por ĝin elstarigi. Aparte ni alvokas la vicprezidentaron de la Brazila Konsilantaro, ke volu fari propagandon pri la okazaĵo kaj ĝin partopreni grandnombre, ĉar la Konsilantaro havos la unuan fokon grandiozan renkontiĝon en Santos. Ni, anoj de BKE, briligu la Seminarion kaj elmontru, ke ni nur labori volas kaj samtempe unuigi deziras ĉiujn geesperantistojn kaj societojn.

Kun granda amikeco ni atendos niajn karegajn gevicprezidentojn, kies valora ĉeesto fortigos la Esperanto-movadon en nia ŝatata Brazilo. Esperantistoj — unuigu ni!

LIVRARIA "PINGO DE LUZ"

Esta livraria, do Sr. ALberto Lourenço, vende livros em Esperanto e Esp ritas.

Est  situada   Rua Marechal Deodoro, 11, em Santos, (SP) — CEP 11.100.

NI SIIGAS . . .

S O PAULO (SP) — La 27-an de marto pasinta San-Pa lo-Esperanto Asocio festis la 40-an datrevenon de sia fondiĝo. En la kadro de la festeno okazis interfratiga tagmanĝo en vegetarana restoracio "Sui o", kiun ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj, inter kiuj oni rimarkis novajn kaj malnovajn gesperantistojn. Ĉeestis ankaŭ aliurbanoj. Multaj vicprezidentoj de BKE estis tie, inter kiuj ni vidis S-ron Jos  Dias Pinto kaj edzino, el Santo Andr  (SP); D-ro Walter Francini, el S o Carlos (SP); D-ro Oswaldo Pires de Holanda, el S. Miguel Paulista (SP); F-ino Elvira Fontes, el San-Pa lo (SP); Nelson Silveira, el San-Pa lo; Gilberto Francisco Bartholomeu, el San-Pa lo; kaj la samideanoj Amarilio Carvalho, el Rio de Janeiro (RJ) Deodato Fran a Mello, el S o Paulo (SP); finfine el Santos ĉeestis prof-ro F. S. Almada kaj edzino,

prezidanto kaj vicprezidantino de BKE.

La etoso estis gaja kaj frata. La tagmanĝo finiĝis kun deklamado de pluraj gesamideanoj, kiuj altnivele ĝojigis la estantaron, kiu siavice ne ŝparis aplaŭdojn al ĉiuj. Estis disdonitaj informiloj pri la Casa do Poeta — “Fanal,” kiu aperigis la interesan verkaĵon de nia vicprezidanto D-ro Walter Francini, en la portugala lingvo: **“LUZ ESPIRITUAL — O ser que recebe a bênção da Dor e cumpre a Lei é um foco de Luz sobre a terra. Seus pensamentos são luz. Suas palavras são luz. Seus gestos são luz e tudo que toca fica iluminado pela luz que se desprende do seu cérebro esclarecido e do seu coração purificado. Aparentemente ele está só, porque percorre caminhos ainda desconhecidos da multidão, mas a luz que proteja atrai a Luz Maior dos Benfeitores Espirituais. Apoiado nessa Força, ele enfrenta a vida e desafia o mundo.”**

SANTO ANDRÉ (SP) — Nia vicprezidantino, Elvira Fontes ankaŭ prezidantino de San-Paŭlo Esperanto Asocio, faris allogan paroladon pri Esperanto por ĉirkaŭ 200 gejunuloj de la Universitato de Santo André, kiuj varme ŝin aplaŭdis. La ĉeestantaro sin manifestis ege interesata lerni la Internacian Lingvon, kaj pro tiu intereso ŝi instruos Esperanton en tiu Universitato, unufoje ĉiu semajne al pli 200 gelnantoj. Ni kore gratulas nian vicprezidantaron, kiu sindediĉe fortostreĉas por disvastigi nian karan idealon.

SANTOS (SP) — Nia redakcio havis la plezuron kaj honoron ricevi la viziton de la jenaj gesamideanoj: Majoro Gilberto A. Silva Velho, nia vicprezidanto, kaj edzino; la gejunuloj Alan Romero kaj Rosana Peixoto Caramaz, membroj de BEJO.

RIBEIRÃO PRETO (SP) — Jam longe silentanta, sed kara al ni, la urbo de la “kafeto” ekvekiĝis. Ni ricevis la bultenon “Es-

peranto”, kiu sciigas nin pri la nova estraro de la societo “RIBEIRÃO PRETO ESPERANTO CLUBE”. La progresiga organizo elektis la jenan estraron, en la 20-a de Novembro pasinta, por la jaro 1977:

Prezidanto:—Arthur Soldati

Vicprezidantino:—Prof.ino Antonieta Almada Miranda

Ĝenerala Sekretario:—D-ro José de Freitas Ramos

Dua Sekretario:—Edna Brigagão Bertagnoli

Kasisto:—Gilberto Mello Brigagão

Bibliotekisto:—Leda Silvia de Freitas Ramos.

En la sama dato estis elektita la Decida Konsilantaro, laŭ la Artº 15-a de la statuto:—Prezidanto, S-ro José Pedro de Miranda.—Sekretario, D-ro José Ignácio.

Ankoraŭ laŭ la statuto, la estraro de la Klubo elektis la jenajn direktorojn por la sekvantaj tri Departementoj:

1)---Publikaj Rilatoj:—Prezidanto, Gilberto de Mello Brigagão.—Sekretario, D-ro José Ignácio.

2)---Ĵurnalismo kaj Dokumentado: Prezidanto, José Pedro de Miranda.—Sekretario, Manoel Moacir Siscati

3)---Edukado kaj Kulturo:—Prezidanto, D-ro José de Freitas Ramos. Sekretario, José Pedro de Miranda.

Ni gratulas la organizon pri la elekto de ĝia nova estraro dezirante, ke ĝi daŭrigu progresante kaj ebligante la progreson de la movado en ĝia regiono.

CAÇAPAVA (SP) — Nia senlaĉa vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho kun sia ĉarma edzino vojaĝis tra Brazilo kaj kontaktis en pluraj urboj la esperantistojn. Li senĉese kunlaboras kun lokaj kaj alilokaj gazetoj propagandante la Internacian Lingvon. Li estis omaĝita de la poŝtofero da la urbo, kiun li utiligis la plejmulte dum la jaro 1976-a, dank'al Esperanto. Gratulon, kara Kunlaboranto!

RIO DE JANEIRO (RJ)— Kultura Kooperativo de Esperantistoj ĉijare organi-

zis, kiel kutime, esperanto-kurson. Unu el ĝiaj kunlaborantoj estas s-ano Haron Jacob Gamal. Ni gratulas kaj deziras sukceson.

PARAÍBA DO SUL (RJ)— Nia juna vicprezidanto Luiz Alberto de Oliveira Coelho, el tiu ĉarma urbo, sciigas nin, ke li konstante propagandas pri Esperanto. Dank'al lia laboro, eklernis la lingvon ĉirkaŭ 20 ĝelernantoj ĝis 18-jaraĝa.

La loka gazeto "Jornal de Paraíba do Sul" helpas disvastigi Esperanton. Ni dankas la kunlaboradon de S-ro Ivo P. Magalhães kaj deziras al nia juna samideano daŭran sukceson.

ACESITA (MG)— Laŭ peto de nia kara vicprezidanto Inĝeniero Adonis Marcelo Saliba Silva, kiu translokiĝis al Acesita, ni komunikas lian novan adreson:—Alameda 31 de Outubro, 460 — apto. 405 — Caixa Postal Nº 192 — CEP-35.180 — Acesita (MG). Li komunikas ankaŭ, ke li fariĝis reprezentanto de la Skolta Esperanto—Ligo, anstataŭante s-ron Euclides el Pará, laŭ peto de S-ro Hammer. Li akceptis kaj kunlaboros.

BELO HORIZONTE (MG) — Nia vicprezidanto por la fako "FINANCAJ AFEROJ" Onésimo Faria, prezidanto de Instituto Esperanto de Educação, unu de la societoj, kiuj fondis la Konsilantaron, atendante la alvokon pri balotado rilata al estraro de nia organizo, skribis al prezidanto de BKE, sugestante la reelekton de la nuna estraro. Ni esperas, ke aliaj sin manifestu tiurilate, laŭ nia peto formulita en niaj lastaj bultenoj.

ILHÉUS (BA) — Nia vicprezidanto Eleus Leonardo de Sá, laŭ kopio de letero, kiun li sendis al Kultura Kooperativo de Esperantistoj en la 12-a se Marto pasinta, informas, ke post la elekto de la nova estra-

ro de Ilhéus Esperanto-Grupo, estis starigita kurso (de la pasinta jaro), sed mankas taŭga libro por instrui, kaj li ankaŭ sciigas, ke la nuna urbestro de Ilheus volas krei Kulturen Palacon en la urbo, kaj li diras, ke estas ebleco enkonduki Esperanton en tiun medion. Ni esperas, ke nia vicprezidanto sukcesu tiun eventon, kaj ke Esperanto progresu tiamaniere en Ilheus.

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn gazetojn kaj dankas:

"La Espero" — monata gazeto, el Koreujo. Ĝi ĉefe pritraktas la lingvon. Havante belegan aspekton, ĝi fariĝas laŭdinda laboro de niaj malproksimaj samideanoj. Ni kore gratulas la resondeculojn de tiu gazeto. Jarabonprezo: US\$ 5,00 — adreso 802, Sejin Bldg., 269 Cheonglin-dong, Jong-gu Seoul, C.P.O. Kesto 2752, Seoul loo — Korea (oni utiligu la Poŝtkeston, preferinde).

"Viver Bahia" — el Salvador (BA); **"O Lider"**, el Barra Mansa (RJ); **"O Taubaté"**, el Taubaté; **"Diário da Tarde"**, **"Velha Guarda"** kaj **"Diário de Minas"**, el Belo Horizonte (MG); **"O Democrata"**, el Indaiatuba (SP); **"Correio Fraterno do ABC"**, el Santo André (SP) kaj **"Aglo"**, el Goianio (GO).

BARRA MANSÁ (RJ) — "O Lider", de Barra Mansa (RJ) informa-nos: — Agora com tres turmas, foram reiniciados no dia 26 de março último os cursos de Esperanto promovidos pela Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Rio, com aulas a cargo do professor Amarilio Carvalho.

"Desenvolvido com pleno êxito no correr do ano passado, o primeiro curso (ministrado na sede do GREBAL) provocou entre nós uma frente ampla para o aprendizado e a prática da lingua internacional", graças principalmente à dedicação de nossa vice-presidente grebalista Denise

Deslandes e do prof. Amarílio Carvalho, incansável sementeiro dos ideais de Zamenhof. Felicitamos os batalhadores.

RIO DE JANEIRO (RJ) — La Societo Eldona "F.V. LORENZ" informas, ke sia anaro kreskas kaj ke la Komitato de la Societo kunsidos por debati la aferojn pri administrado, okaze de la XII Brazila Seminario de Esperanto, en Santos (SP)

RECIFE (PE) — Informa-nos o presidente da Associação Pernambucana de Esperanto que a 16 de abril ocorreu Assembleia Geral Ordinária com a finalidade de eleger sua diretoria, a qual foi empossada na mesma data. Eis a Diretoria eleita:

Presidente: Ruy Caneca Sobreira
Vice-Presidente: .. Amaro Pinangé Soares
Secretário-Geral:.. Lenilda de L. Sobreira
Vice-Secretário:.. Arnon R.B. Vasconcelos
Tesoureiro: Maria José Pontes
Vice-Tesoureiro .. Amílcar de Souza Leão
Bibliotecário: Gabriel M. de Oliveira

Conselho Fiscal: - Severina Pereira dos Santos e José Teóclito C. Araujo Filho.

JUNULARA ANGULO

La Brazila Esperanta Junulara Organizo — BEJO informas, ke estis fondita ĝia sidejo en Bona Espero, kie la gejunuloj faros sian libertempan domon. La domo troviĝas en pitoreska regiono ĉirkaŭita de pluraj fruktarboj kaj floroj.

La dometon oni devas ripari ĉar ĝia tegmento kaj aliaj partoj ne troviĝas en bonaj kondiĉoj, inkluzive la riverponto, kiun la lastaj pluvegoj detruis.

La barilo ankaŭ por eviti la viziton de sovaĝaj bestoj estas necesa. Tiel estas ripa-

rendaj: 1) La ponto kaj barilo; 2) la tegmento; 3) la planko, banejo kaj forno.

Nia junularo urĝe bezonas materialon kaj monon. Ili intencas kunveni tie post la XII - a Seminario por eklabori. Estas intenco utiligi la domon okaze de la Universala Kongreso. Sugestoj estas atendataj avide, krom programoj kaj precipe monhelpo.

La unuan fojon okazas, ke BEJO serioze klopodas akiri sidejon. Ili nepre bezonas nian klopodon. Multaj el ili gvidas kursojn, propagandas pri Esperanto kaj nun volas praktike labori kaj progresi.

Ni alvokas niajn ĉiam helpemajn gesamideanojn, elmontri kune kun ni nian amon al niaj anstataŭantoj, al la nunaj junuloj. Ni helpu ilin.

Ke ni fariĝu membroj de BEJO, ĉar la esperantistaro ne maljuniĝas. En Esperanto-Movado spirite neniu estas olda, sed aktiva, gaja kaj progresema. Helpu ni nian junularon. Jen la kotizoj de BEJO: — Junuloj (ĝis 30 jaroj) — simpla membro CR\$ 40,00; membro subtenanto CR\$ 50,00. Plenkreskulo (pli ol 30 jaroj) — helpanto CR\$ 50,00; protektanto CR\$ 100,00 aŭ pli. Oni sendu la monon al Banco Brasileiro de Descontos S.A. — Agencia Cinelândia je la nomo de Heloiza Alves Faria e/ou konto 4554 -3 — Rio de Janeiro (RJ) — kaj la aliĝilon oni sendu al Poŝtkesto 18 ZC — 00 — CEP 20.000 — Rio de Janeiro (RJ) — Brazilo.

La junularo okazigos gravan renkontiĝon en la kadro de la 12-a Seminario, en Santos. Nian redakcion vizits la ĉarma junulino Rosana Peixoto Carames, kiu multe aktivas en BEJO nuntempe. Ni kore dankas ŝian viziton. Ŝi informis, ke la junularo intencas elekti la "Fraŭlinon Esperanto" dum la Seminario, kaj pri la afero oni jam propagandas grandskale.